# Trapasu la KER-ekzamenojn de UEA-ITK

## Ĉu ...?

Ĉu ankaŭ vi deziras pruvi per oficiala ŝtata diplomo vian lingvoscion pri Esperanto ?
Ĉu vi scias ke en Hungario jare plurmil homoj ekzameniĝas pri Esperanto kaj uzas la akiritan atestilon por havi avantaĝojn en siaj studoj kaj laboro?
Ĉu entute vi scias kiunivele vi konas nian lingvon ?

*UEA kunlabore kun la hungara ekzamencentro, aneksita al la prestiĝa budapeŝta Universitato Eötvös Loránd funkciigas novan ekzamensistemon, laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) de la Konsilio de Eŭropo.*

## Institucio

La KER- ekzamenoj estas ellaboritaj en **niveloj B1 (komencintoj), B2 (mezniveluloj) kaj C1 (progresantoj)**.
Mem la atestilo estas impona, oficiala dokumen-to, verkita en 4 lingvoj (en Esperanto, angla, germana kaj franca).
La funkciigo de la sistemo okazas kunlabore kun la Ŝtata Lingvoekzamena Centro ORIGO en Budapeŝto, kie Esperanto troviĝas inter la oficiale rekonataj fremdaj lingvoj.
Nia hungara partnero ORIGO estas plenrajta membro de la Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo ALTE,

## Prezoj

Bazaj prezoj:

**70 (B1)- 80 (B2)- 90 (C1) eŭroj**

Por landoj: Aŭstralio, Aŭstrio, Belgio, Britio, Danio, Finnlando, Francio, Germanio, Greklando, Hispanio, Irlando, Islando, Italio, Japanio, Kanado, Luksemburgio, Nederlando, Norvegio, Nov-Zelando, Svedio, vislando kaj Usono.

A-landoj: 44(B1)-48(B2)-54(C1) eŭroj

Ĉeĥio, Estonio, Honkongo, Hungario, Israelo, Kipro, Korea Respubliko, Latvio, Litovio, Malto, Pollando, Portugalio, Singapuro, Slovakio, Slovenio, Sud-Afriko kaj Tajvano

B-landoj:

34(B1)-38(B2)-42(C1) eŭroj

**Argentino, Brazilo, Ĉinio**, Rusio kaj ĉiuj supre ne listigitaj landoj.

## Informo

Detalajn informojn vi povas trovi kaj tuj aliĝi en la paĝaro www.edukado.net/ekzamenoj/ker.
En la sekcio PRISKRIBOJ vi povas legi la detalan prezenton pri la postuloj kaj strukturo de la ekzameno.
Vi certe rimarkos, ke kompare kun la malnova ILEI-UEA-ekzamenoj en la KER-ekzameno nur en la parola parto estas kelkaj demandoj traktantaj la movadajn kaj kulturajn konojn pri Esperanto, la skriba parto ne entenas tiajn taskojn.
Por interesuloj ni aparte konsilas libere elŝuti la libron *Esperanto de nivelo al nivelo*, kiu entenas ĉiujn necesajn informojn kaj seriojn de **specimenoj** je ĉiu nivelo de la ekzamensistemo.




## Sesioj

Por la sekva periodo estos sesioj en

**2017**

**10a de junio**:**Tutmonda Ekzameno** en Londono (GB), Parizo, Saint-Brieuc, Greziljono, Chaumont (FR), Malmö (SE), Leipzig (DE), Subotica (RS), La Chaux-de-Fonds (CH), Managvo (NI), Zaragoza (ES), Moskvo (RU), Bogoto (CO), Maceió (BR) kaj eble aliaj
**24a de junio**: Teruelo (ES)
**2a de julio**: Raleigh (US) kaj Herzberg (DE)
**9-11 de julio**: Raleigh US – NASK
**29a julio: UK en Seulo** (KR)

Organizantoj de grandaj eventoj kaj renkontiĝoj, interesataj kunokazigi sesiojn, kontaktu Katalin Kováts ĉe ker-ekzamenoj@edukado.net.




Inter 2009 kaj 2016 jam **1851 esperantistoj el pli ol 70 landoj** trapasis la ekzamenon .
Se ankaŭ vi volas trapasi la novajn KER-ekzamenojn, petu informojn pri la sekvaj sesioj ĉe UEA aŭ rekte de Katalin Kováts, je la adreso ker-ekzamenoj@edukado.net